

TeKu 156 - Novembro 2017

## Terminara Kuirejo:



### Karaj gekolegoj,

jen bona informo de Internacia Fervojo-unio *UIC*: Ĉar terminologio *Rosalinde Taucher* pro nasko de filino ĉesis labori tie, sinjoro *Nicolas Raynal* transprenis la taskon de terminologo. Eksciante ke Esperanto estas unu el la 27 datenbankaj lingvoj, li ekinteresiĝis pri nia lingvo kaj antaŭĝojas pri fruktodona kunlaboro. Sinjoro *Raynal* havas plurajn ideojn por pliaj uzebloj de la datenbanko. Lastatempe mi multe rete diskutis kun li kaj eĉ povis helpi pro miaj jardecaj spertoj.

Mi esperas, ke li ankaŭ baldaŭ realigos la planon de *UIC*, ĉiujare eldoni aktualigitan version de sia porklienta reta terminaro *RailLexic*. La aktuale atingebla terminaro havas ankoraŭ stacion de Novembro 2015, kvankam mi ekde tiam enigis preskaŭ 200 tradukitajn difintekstojn, kiujn ĝis nun povas legi nur korespondantoj de *UIC*.

Bedaŭrinde mia lastjara alvoko, informi pri viaj spertoj kaj demandoj ĉe uzo de la nova plejmoderna terminara alireblo, restis sen eĥo. Ĉu vere ne montriĝis problemoj? Fine mi konstatas, ke pli kaj pli estiĝas malfacile, inter la multaj ankoraŭ ne tradukitaj difinoj trovi sufiĉe interesajn nociojn por diskutado en Terminara Sekcio. Tamen la serĉado estas daŭrigata, por ke ni ne plendu pri mankantaj taskoj.

Heinz Hoffmann

## Transrapid 09 survoje hejmen



Transrapid 09 nun trovis sian ripozlokon, proksime de la esplorcentro *Lathen*, sur la tereno de kolbasofabriko

(vidu terminon 11122)

(bildo: Wikimedia, Álratka)

## Terminaraj decidoj en Colmar:

### TeKu 154

**14371**

grupvoko unudirekta

**14796**

grupvoko plurdirekta

**04744**

malkonektilo ŝaltselcia

**06726**

kontaktlineo-aranĝaĵo sekciizola

**14798**

relvojekipaĵo ETCS-rilata

### TeKu 155

**01682**

vakveturo de motorvagono

**04479/05431**

vakveturo de lokomotivo

**03346**

nadlorempinta disetendo

**12685**

relkomutila intera pozicio

**08561**

nadlorela fikspunkto

**10362**

kontaklinea elastecvarieco



**10363**

kontaklinea elastecegaleco

**14800**

„trajnkompleta konfirmo“ pro opinidiverseco kaj tempomanko provizore senŝanĝe konservata

## Kaj ankaŭ ĉifoje denove: Novaj taskoj – novaj taskoj – novaj taskoj

<b>02987</b>	Distanco inter du mezurpunktoj ĉe la radflanĝoj de radakso, kiuj troviĝas po 10 mm ekstere de mezurcirklo ĉe transiro de kavkanaeto al radflanĝo.			
	ĉeĥa	<i>vnější vzdálenost okolků</i>	itala	<i>distanza esterna tra i bordini della ruota</i>
	dana	<i>ydre hjulflangeafstand</i>	kroata	<i>vanjski razmak između vijenaca kotača</i>
	franca	<i>écartement des faces actives des boudins</i>	pola	<i>rozstaw zewnętrznych obrzeży obręczy</i>
	germana	<i>Spurmaß</i>	rumana	<i>distanță între fețele exterioare ale buzelor de bandaje</i>
	hungara	<i>nyomkarimák külső felületei közötti távolság</i>	slovena	<i>razmik med zunanjimi robovi sledilnih vencev</i>
			Esperanto (ĝis nun)	<i>distanco ekstera inter radflanĝoj</i>
<b>Terminproponoj:</b>	<b>1) radodistanco ŝpurorilata</b> <b>2) radodistanc-mezuro laŭŝpura</b>			
<b>06016</b>	Signalila lampo, ĉe kiu la bildsignalo estas elektata fare de mekanismo aranĝanta unu el plurajn kolorvitraĵojn proksime al la fokuso de lensaro antaŭ la lampon.			
	ĉeĥa	<i>světelné návěstidlo s pohyblivou barevnou clonou</i>	itala	<i>segnale luminoso a schermo mobile colorato</i>
	dana	<i>lyssignal med bevægelig farveskive</i>	kroata	<i>svjetlosni signal s pomičnim zaslonom u boji</i>
	franca	<i>unité lumineuse à oculaire mobile</i>	pola	<i>sygnalizator z przesłoną barwną</i>
	germana	<i>Blendensignal</i>	rumana	<i>panou luminos cu filtru colorat mobil</i>
	hungara	<i>fényjelző mozgatható színelőtétellel</i>	slovena	<i>svetlobni signal s pomičnimi barvnimi stekli</i>
			Esperanto (ĝis nun)	<i>lumsignalilo kun movebla kolorokulario</i>
<b>Terminproponoj:</b>	<b>1) signalila lampo kun moveblaj kolorvitraĵoj</b> <b>2) signalila lampo mekanisme diverskolora</b>			
<b>Komento</b>	Laŭ la difino klare temas pri objekto ĉe mekanika signalilo, do ne laŭ pluraj nacilingvaj terminoj pri lumsignal(il)o.			

06064

**Transporto, kiu ne estas enlistigita en transportkontrakto, aŭ ne estas enskribita en veturdokumentoj.**




ĉeĥa	<i>pokračování v jízdě po spádu</i>	itala	<i>percorso ulteriore non ferroviario</i>
dana	<i>viderebefordringsstræk ning</i>	kroata	<i>dopunski prijevoz</i>
franca	<i>parcours au-delà</i>	pola	<i>przewóz pozakolejowy</i>
germana	<i>Nachlaufstrecke</i>	rumana	<i>parcurs după părăsirea căii ferate</i>
hungara	<i>fuvarozási szerződésen kívüli útszakasz</i>	slovena	<i>dodatni prevoz</i>
		Esperanto (ĝis nun)	<i>distanco ne inkludita en transportkontrakto</i>

**Terminproponoj:**

- 1) kargotransporto postorigina
- 2) kargotransporto aldonkontrakta

**Komento:** Temas pri vagonkargo, kiu en destinstacio estas aŭ nur parte dekarigata aŭ per alkargado pligrandigata, kaj kun nova transportletero sendata al nova destinstacio.



traksideo kun pleniga betono  
surkonstrua plato  
glitfendo kun „11499“  
remburajo  
ĝibo  
izolaĵo  
protekta betono

La glitfendo permesu laŭlongan ŝoviĝon de la trako


11499

**Folio metita inter senbalasta trako kaj pontkonstruaĵo, ebliganta ŝoviĝon de la komponantoj unu kontraŭ la alia, ekzemple ĉe temperaturkaŭza dilatigo aŭ ĉe dinamike ŝanĝiganta trafikokaŭza ŝarĝo.**

ĉeĥa	<i>kluzná fólie</i>	itala	<i>piastra di scorrimento</i>
dana	<i>glidefolie</i>	kroata	<i>klizna folija</i>
franca	<i>feuille de glissement</i>	pola	<i>folia ślizgowa</i>
germana	<i>Gleitfolie</i>	rumana	<i>folie de alunecare</i>
hungara	<i>hézaglemez</i>	slovena	<i>drsna folija</i>
bulgara		Esperanto (ĝis nun)	<i>glitfolio</i>

**Terminproponoj:**

- 1) glitfolio surponta
- 2) ŝoviĝfolio subtraka



Kaze de bezono la portŝuoj servas bremscele kiel frikciaj elementoj

**11122**

**Stato de magnetvojoj veturiloj post malŝalto de la portmagnetoj, je kiu la veturilo kuŝas sur portŝuoj.**

ĉeĥa	<i>dosed</i>	itala	<i>atterraggio</i>
dana	<i>sænkning</i>	kroata	<i>nalijeganje</i>
franca	<i>atterrissage</i>	pola	<i>osiadanie</i>
germana	<i>Absetzen</i>	rumana	<i>aterizare</i>
hungara	<i>leülés</i>	slovena	<i>naleganje</i>
		Esperanto	<i>ŝvebĉeso (magnetvojo)</i>
		(ĝis nun)	

**Terminproponoj:**      **1) ŝvebĉeso (magnetvojo)**  
                                  **2) surtrabiĝo (magnetvojo)**

**Faka Komisiono de IFEF:**

Gvidanto:      Jan Uldal Niemann  
 Adreso:        Hovedvagtstræde 9E, 1  
                     DK-3000 Helsingør  
 Telefono:      +045 71 70 63 83  
 Retadreso:    niemann@kabelmail.dk

**Terminara Sekcio:**

Sekretario:    D-ro Heinz Hoffmann  
 Adreso:        Finstere Gasse 2  
                     DE-01445 Radebeul  
 Telefono:      +049 351 83 85 877  
 Retadreso:    hoffmann-ifef@cablemail.de